

# SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN LA ESPERO

April 1946

34 årg. Nr 4

ORGAN FÖR SVENSKA ESPERANTO-FÖRBUNDET

## SAMLING VID HAVET.

Se även sid 37:  
Somera Universitato.



Det kluckar och porlar, plaskar och droppar ut-  
efter bergsidorna. Vintergäcken lyser gul i den  
svarta rabatten. En solstråle skjuter genom moln-  
täcket och träffar en prisma på skrivbordet, där  
den strålar ut i en intensivt lysande grön stjärna.

Jaha. Det är vår. Dagarna rullar snabbt undan.  
Om ett par månader firar vi SEF:s 40-årsjubileum  
i Uddevalla.

Jag antar, att det vid det här laget är enom och  
allom bekant, att Förbundet kallat till samling vid  
havet i pingst. Vid Byfjordens leende strand. I den  
goda staden Uddevalla.

Vi esperantister har just nu behov av att laddas  
opp, så att vi kan ta de inspirerade och kraftiga  
tagen för Esperanto i dagar, som nu kommer. Udde-  
valla blir alltså årets laddningsstation. Det är där  
vi ska nagelfara det framfarna och framförallt  
dryfta framtidens frågor. Därtill kommer att vi ska  
ha det trivsamt och glatt tillsammans.

Det är något alldeles särskilt med dessa årliga  
sammankomster än här, än där ute i Sveriges land.  
Bekanta och obekanta, pionjärer och nykomlingar,  
alla förenade i en god vilja för ett stort gemensamt

mål, samlas till allvar och gamman, till rådslag och  
festlig samvaro.

Naturligtvis bör det bli något av en upplevelse  
för inlandsfolk och ostkustbor att komma ner till  
Västerhavets salta våg och den smekande idyllen  
Uddevalla. Vi har i Loka Kongresa Komitato be-  
ställt ett strålande sommarväder, så att vi riktigt  
ordentligt ska kunna njuta av pingstdagarna.

Anmälningar mottas omgående på postgiro  
297885 under adress Esperantokongressen, Box 900.  
Kongressavgift 5 kronor.

Vi väntar, att denna jubileumskongress ska sam-  
la esperantister från när och fjärran. Reservera  
pingsten för ett besök hos samideanoj i Uddevalla.

Någon världskongress får vi inte vara med om i  
år, men av alla tecken att döma, så kommer kon-  
gressen i Uddevalla att gästas av flera utländska  
esperantister. Det blir alltså en internationell sam-  
ling, och det bör väl sporra lite var i vårt avlånga  
land att ställa in sig på Uddevallas våglängd. Väl-  
komna! Vi har mottagningsapparaten uppställd.

*Ede.*



**LETERO EL BUDAPEST.**

Feliĉan novan jaron!

Budapest, 2. 1. 1946

Tuj post de la teruro kaj post resaniĝo de trimonata sangveneniĝo, mi eksidis al mia skribotablo kaj profitante la liberecon mi verkis 40-paĝan (grandformatan) propagandan broŝuron pri nia lingvo kaj pri ĝia signifo en la nova periodo alvenonta. Komprenoble hungarlingve. Tuj poste por kompensi la mankon mi verkis grandan kaj tre detalan gramatikon por miaj samlandanoj. La unua libro jam aperis, la dua ĵus estas sub preso. Krome mi faris kelkajn kursojn por kursgvidantoj kaj ankaŭ por novaj adeptoj; mi faris paroladojn en lernejoj, fabrikoj kaj en la Universitato, en provincaj urboj... Sed ĉion ĉi en kia

**situacio persona,**

pri tio mi eĉ ne volas paroli. Sufiĉe estas menciitaj, ke en la pasinta jaro mi ne satmanĝis pli ol kvar-kvinfoje kaj nun, kiam la cirkonstancoj eĉ pli malboniĝis koncerne la nutradon, la fastado jam minacas per katastrofo. Kion fari? Multaj dekmiloj ja troviĝas en la sama situacio, precipe tiuj, kiel ankaŭ mi, kiuj havas nenion por vendi.

Dum la milito trifoje mia hejmo estis prirabata kaj nun mi staras en la mezo de la vintro preskaŭ sen vestoj, sen tolaĵoj. La fenestroj de mia hejmo estas rompitaĵoj, hejtmaterialo same ekzistas nur en teorio kaj la necesa nutraĵo eĉ teorie ne ekzistas. Kiel mi povos ĝisvivi la frostan sezonon en paro da eluzitaj galoŝoj sen ŝuoj, vere mi ne scias... La senvalorigo de nia mono jam estas sufoko terura. Por doni al via imagpovo ilustron jen: mia monata salajro (Ne la plej malbona salajro!) sufiĉus aĉeti nur unu k. kvaronan kilogramojn da sukero aŭ du litrojn da oleo, kaj se mi dezirus aĉeti vestaĵon, mi bezonus minimume sesmonatan salajron en unu sumo por unu porvesta ŝtofo.

Nun, de post tri monatoj mi havas postenon salajratan ĉe la nova, demokratie organizata polico, pli ĝuste mi estas la organizanto kaj kultura referento de la

**Budapeŝta Polica Societo,**

kiu estas la socia kaj eduka organizaĵo de la ŝtatpolica korporacio. Mia laboro estas ja vere belega, kvankam ĝi postulas de mi tagan kaj noktan fortostreĉadon. En la kadro de la societo ĵus fondiĝis ankaŭ esperantosekcio por grupigi la esperantistajn policianojn kaj por eduki novajn adeptojn. Pli ol 200 novaj policianoj anoncis sin por la kursoj, sed la nombro ĉiutage kreskas. Se la tempo, la progreso de la packonstruo internacia favoros plu, certe tiu ĉi sekcio fariĝos unu el la plej gravaj organizaĵoj de nia movado en Hungarlando. Mi turnas min al vi kun peto, bonvolu, se eble fari propagandon por tiu nova sekcio kaj helpi ĝin per sendo de broŝuroj, esp. gazetoj, per komenco de korespondado, per sendo de adresoj de policaj kolegoj, kiuj interesiĝas pri nia afero ktp. Vi ne povas imagi la soifon al eksterlandaj sciigoj kaj kiel ili dezirus jam persone sperti la avantaĝojn de nia lingvo, pri kiu ili aŭdis nur de propagandistoj aŭ de mi, ilia instruanto.

Sendu la suban tekston al la Sveda Esperanto Gazeto:

**"Julio Baghy, vicprezidanto de la Esperantista Akademio, kore salutas siajn svedajn geamikojn kaj deziras feliĉan novan jaron al ili. Li tre volonte ricevis vivsignon de ili kaj post la pliboniĝo de la poŝta interrilato li klopodos respondi. Nun, bedaŭrinde estus preskaŭ neeble sendi tujan respondon. Adreso: Budapest, Rottenbiller u 66. Hungarlando."**

**La Hungaria Esperantista Societo Laborista,**

neniigita dum 1933, denove refondiĝis kaj komencis vigan propagandan vivon. Bedaŭrinde la membroj estas okupataj de la ĉiutaga batalado por la panpeceto kaj tial la tuta movado ankoraŭ stagnas, sed... sed ni ne perdis esperon. Renkontante nin ni reciproke havas la salutvorton: ESPERON! Tiu salutmaniero iom post iom fariĝas ĝenerala. Cetere mi petas vin, interpretu mian samsideanan saluton al viaj samklubanoj!

Atendante vian respondon salutas vin refoje via amiko  
**Julio Baghy.**

**Josef Vitek sukcesas en Svedujo**

Kiam vi, karaj gesamideanoj, legas tiujn ĉi liniojn, nia ŝatata samsideano Josef Vitek el Hradec Králové, Ĉeĥoslovakujo, prelegas ie en la meza parto de Svedujo. Tien li venis post vizitoj en la okcidenta kaj suda partoj. Ĉie oni danke akceptis lin, kaj plurfoje li havis publikan prelegon antaŭ granda publiko.

La gazetoj ĉie rakontas pri lia intereso por esperanto kaj pri la forta esperantomovado en Ĉeĥoslovakujo. Ĝis nun la prelegvojaĝo estis nur sukcesa, kaj SEF esperas, ke oni daŭre montru intereson al la unua oficiala esperantoparolanta prelegisto, kiun la ĉeĥoslovaka respubliko sendis eksterlanden.

La plej suda prelegloko estis Ystad. La plej norda estos Kiruna en la fino de majo. Do li veturos de la suda limo ĝis la norda. Li havas kaj havos eblecojn rigardi nian tutan landon, kaj samtempe la esperantokluboj kaptas la okazon denove kontakti kun eksterlanda prelegisto, kiu en nia kara lingvo rakontas pri sia propra lando.

Entute sukcesa prelegserio.

Str.

**IAPK****Filatelistoj observu.**

Internacia Asocio de Poŝtmark-Kolektantoj (IAPK) estas fondita laŭ instigo de IEL.

La nova asocio, kiu havas centran oficejon kun adreso: XPDO House, Didcot, Berks, Anglujo, celas—

1.—Organizi interŝanĝ-servadon por ke kolektantoj povu interŝanĝi markojn pere de la asocio.

2.—Uzi Esperanton kiel la solan lingvon en internaciaj rilatoj.

3.—Instrui la anojn laŭ kolektiva kurzo, por ke ili senpere rilatiĝu kun anoj eksterlande.

4.—Organizi pograndon aĉet-vendadon inter grupoj, per kiu komercado la grupoj profitu por la bono de siaj kaso.

5.—Eldoni tutmondan gazeton filatelistan en la Esperanta lingvo.

Tiu gazeto ricevis la nomon "La Internacia Bulteno" kaj venis kun "Unua Internacia Numero" dulingva. El la programo de la gazeto ni povas noti, ke la redakcio esperas, ke "kun la tempo la enhavo konsistos el la sekvantaj sekcioj:

- (1) Oficialaj anoncoj de la Asocio.
- (2) Babiladpaĝo pri interesaj aferoj kaj personoj en la Filatela mondo.
- (3) Kurzaj notindaĵoj enlandaj kaj el eksterlando.
- (4) Komentario pri novaj eldonoj.
- (5) Artikoloj kun speciala intereso el la alilando.
- (6) "Malferma Forumo" por diskuti pri ideoj kaj sugestoj de membroj.
- (7) Ĝenerala korespondaĵo de membroj pri aferoj interesaj.
- (8) Specialista fako.
- (9) Junula fako.
- (10) Alilingva fako por alilanduloj".

**HEROLDO DE ESPERANTO.**

Heroldo, la ŝatata semajna gazeto de la intermilita tempo, reaperos. Laŭ cirkulero de redaktoro Teo Jung li klopodos komence fari la gazeton duonmonata kaj poste pligrandigi ĝin, kiam la cirkonstancoj permesos tion. La abonprezo en Svedujo estas 9 kr, kion oni senprokraste povas sendi al "Heroldo de Esperanto, poŝtgiro 4180, Stockholm".

**LETERVESPERON**

aranĝos en aprilo la esperantistoj en Eskilstuna, Svedlando. Leterojn k. kartojn sendu al: La Stelo, S:ro A. Hertzman, Rosenhällsgatan 6, Eskilstuna, Svedlando.

**Palestino.** Från en lärare vid ett gymnasium i Jerusalem har ett brev letat sig till Sverige, vilket erbjuder mycket av intresse, men som vi på grund av dess längd inte kunna trycka av. Anledningen till brevet är att brevskrivaren, som hoppöst grubblat över hur det kan komma sig, att han endast kunnat finna två folk, som velat hjälpa judarna mot deras bödlar, plötsligt tror sig ha funnit förklaringen härtill, då han fått i sin hand två böcker: **Sveda Antologio** och **La Fino**. Bortsett från, att hans uppfattning är orättvis mot många folk, är det dock av intresse att läsa om hans syn på vad som hänt. Bara två folk, skriver han, hjälpte oss: danskarna genom att slåss och svenskarna genom att inte slåss, genom att förbli neutrala, så att de kunde ta emot oss.

När han studerar vår litteratur i **Sveda Antologio** och rapporten i **La Fino**, då förstår han av dess ädla och upphöjda innehåll ursprunget och grunden till folkets hjälpsamhet och vår dynastis orädda initiativ och arbete. Han slutar med en önskan, att denna hans uppfattning måtte bekantgöras inte som hans privata mening utan som den allmänna meningen i Palestina, något som han anser sig kunna bevisa vara fallet genom hänvisning till artiklar i alla Palestinas tidningar och tidskrifter. — Vi få nog ta emot hans beröm med största ödmjukhet, men också som en sporre i den hjälpaktion, i vilken vi säkerligen under de närmaste åren måste delta med större och större uppoffringar.

**Danko** Laŭ dankleteroj el Nederlando ni povas konstati, ke niaj helppakajoj alvenis en bona ordo. La Amsterdamanoj decidis dividi ĉion en tri partoj, kiujn oni sendis al la tri plejmulte trafitaj sekcioj de la Nederlanda asocio, nome Rotterdam, Arnhem kaj Den Helder.

De la laste nomitaj alvenis priskriboj de la gajaj kunvenoj, dum kiuj la senditajoj estis dividitaj inter la membroj.

**Nederlando.** Laŭ decido de la 22a de dec 1945 nun estas fondita Nederlanda Centra Komitato Esperantista (NCKE). La fondintoj estas

Federacio de Laboristaj Esperantistoj en la regiono de la nederlanda lingvo (F. L. E.), la Nederlandse Esperantisten-Vereniging „La Estonto Estas Nia” (L. E. E. N.), la Nederlandse Rooms-Katholieke Esperantisten Bond „Nederlanda Katolika” (N. K.), kaj la Nederlandse Christelike Esperanto-Vereniging „Nederlanda Kristana Esperanto Asocio” (N. C. E. V.).

N. C. K. E. reprezentas la nederlandan esperantistaron antaŭ ŝtataj kaj publikaj instancoj, kaj okupas sin pri ĉiuj taskoj, kiuj estas komunaj al la partoprenantaj asocioj.

Krome ĝi konsistigas la daŭran kontakton inter la kunlaborantaj asocioj.

Prezidanto estas sinjoro A. Veen, kaj sekr-kas sinjoro A. F. Leideritz Jr., adreso Vechtstraat 52, Amsterdam-Zuid.

**Hungarlando.** En Budapeŝta Polica Societo, kiu entenas la tutan korporacion demokratan de la ĉefurbo, estas fondita esperanto-sekcio. Prez: Josefo Migadja, polica subkolonelo. Sekr: sro Julio Baghy, adr: Nador u 16 I:e 116, Budapest VII.

**BULGARUJO.** Ivan H. Krestanov, L. K., publicisto kaj fremdlingva profesoro en la gimnazio de sia naskurbo PIRDOP, salutas siajn esp. geamikojn, anoncante, ke dank al Dio, li savigis de la bombardado en Sofia, sed — ho ve — bruliĝis lia loĝejo, tuta meblaro kaj multekosta biblioteko multlingva, precipe esperanta (pli ol 3000 binditaj volumoj kaj 713 gazetkolektoj de la tuta mondo, li posedis preskaŭ ĉiujn esp. librojn kaj gazetojn aperintajn, en plej bona stato), lia trezoro, ĝojo kaj fiero, io nerestariĝebla kaj neforgesebla...

**Bulgarien.** En Sofia-tidning berättar om den återuppståndna esperantorörelsen i Bulgarien och uppehåller sig särskilt vid det intresse studenterna visar för de av bulgariska esperantoförbundet anordnade kurserna. För studenterna är givetvis inlärandet av esperanto ett lekverk. Efter en månads studier äro de färdiga att anmäla sig som korrespondenter och att fakultetsvis bilda esperantoklubbar.

#### FINLAND.

**Folkskolekurs.** I Uleåborg har uppdragits åt s-ro Allan Methonen att undervisa i esperanto i folkskolans högre klasser. Samtidigt öppnade ett par esperantister en annonskampanj i stadens största tidning "Kaleva", där man efter råd och lägenhet lämnade korta meddelanden om esperanto. Resultatet blev glänsande. Över 100 lärjungar anmälde sig till kurserna. Lärarkrafterna räckte inte till, utan man måste tvinga äldre esperantister i staden att gripa in som hjälplärare.

**Germanujo.** El adiaŭa letero ni citas: Mi forlasos libervole Svedujon veturonte al mia hejmlando — Germanujo. Dum du jaroj mi restadis kiel rifuĝinto en Svedujo kaj ĝuis ĉie la gastamon kaj amikecon de la sveda esperantistaro, kaj mi ne volas prokrasti esprimi mian plej koran dankon al Svedujo kaj ties popolo. Volonte mi rememoros la tempon travivitan en via lando. Dankon! Ĝis reaŭdo kaj ĝis revido! Via sincera germana samideano Rudolf Petri.

Malpacience ni atendas novajn sciigojn el Germanujo.

**Belga Ligo** sendos peton pri aprobo de Esperanto al ĉiuj kandidatoj-deputitoj je la venonta reelektado de la parlamento kaj intencas publikigi liston de la respondoj.

**Belgio.** En Belgio kiel en Nederlando oni sentas maltrankvilon antaŭ la multnombro de la novestarantaj esp-organizoj enlandaj kaj internaciaj.

Dum en Nederlando oni serĉas la solvon, starigante komunan enlandan komitaton, la belgoj deziras, ke ĉiuj organizoj en la tuta mondo unuigu. Tiu propono venas el Brugge, kie "Flandra Ligo Esperantista" havas sekcion "Paco kaj Justeco", kaj la propono estas ke la estraroj de la internaciaj neŭtralaj unuigoj kunvenu por ellabori komunan agadplanon, tiel ke poste ili povu persvadi la ne-neŭtralajn organizojn pri ia komuna organizo kaj agado.

## Georges Duhamel

famkonata franca verkisto, ano de la  
'Franca Akademio

prezentas sin al vi per la belaj, riĉe ilustritaj  
libretoj

**Norda Kanto** (pri Finnlando) broŝurita kr 1: 50  
bindita „ 2: 25

**Rakontoj pri Nederlando** . . . broŝurita „ 1: 50  
La verkojn tradukis nia franca samideano  
Roland Dupuis, Rouen.

Mendu per poŝtkarto senprokraste. La libroj  
estas sendotaj poŝtrepage sen aldono de afranko.

Lennart Aberg, Box 16, Skövde.

## ESPERO.

Malvarmaj ventoj blovas,  
la vintro venis nun.  
La froston nur ni trovas,  
forĝesis nin la sun.

Sed tamen ni esperas  
al la printempa ĉarm,  
kaj kvankam nun  
vesperas,  
ni kredas al la varm.

La tero blanka kuŝas  
dormanta sub la neĝ.  
La varmon nun forpuŝas  
severa vintra reĝ.

Kaj en malhela tempo,  
en noktonigra hor  
ni kredas al printempo  
en la homara kor.

Malte Markheden.

### URBESTRO CARL LINDHAGEN †

La 11 marto mortis unu el la plej elstaraj svedoj, nome urbestro Carl Lindhagen, 85-jara.

Dum sia longa vivo li estis konstanta batalanto por diversaj reformoj, celantaj plibonigon de la cirkonstancoj por la homoj. Kiam li suspektis subpremon ĉu en la politiko, ĉu en la ekonomiaj rilatoj, ĉu en la kultura vivo, li ne hezitis tuj ĵeti sin en la breĉon. Lia mondpercepto ankaŭ gvidis lin al la konvinko, ke mondlingvo estas necesa. Kiel parlamentano li en tre multaj proponoj pledis por la mondlingva ideo, speciale por Esperanto. Kaj en miloj da publikaj prelegoj li rekomendis Esperanton kiel solvon de la interpopola lingva konfuzo.

Kvankam li mem neniam havis tempon finligni Esperanton, li fakte estis unu el la plej fervoraj batalantoj por nia lingvo. Li ankaŭ estis elektita honora membro de SEF. Kaj li multfoje partoprenis niajn kongresojn. Kiam li lastfoje ĉeestis, pasintjare, li aŭdigis sian voĉon por proponi vivkrion: "Por la libereco de ĉiuj popoloj kaj por la paco de la tuta mondo".

Honoron al la memoro de Carl Lindhagen!

E. Malmgren.

### GUSTAV NYQVIST †

Skara Esperanto-klubb havas funebron. La 18an de februaro 1946 mortis, 52-jara, nia prezidanto Gustav Nyqvist. Naskita en Högstena, Västergötland, li en juna aĝo komencis la tajloran profesion. Li praktikis sian metion en Lund, Köpenhamn, Stockholm kaj aliaj lokoj. Fine li en Skara komencis propran entreprenon, kaj li estis lerta metiisto.

En la esperantista armeo li estis fidela batalanto proksimume 30 jarojn. Persone li estis tre bonkora kaj modesta. Lia memoro vivos ĉe ni! Gesamideanoj el Lidköping, Skara kaj Skaraborgs esp-distrikto, Skövde, sendis florojn al lia tombo.

H.

## La Internacia Asocio de Poŝtmark-kolektantoj

I. A. P. K. estas praktika Esperanta Asocio donante al la filatelistoj deziratajn P. M. kontraŭ iliaj duobloj.

Svedaj filatelistoj estas bonvenaj kiel membroj en I. A. P. K. Tiuj, kiuj ne lernis Esperanton havas la ŝancon utiligi la grandajn internaciajn favorojn kiujn la Esperantomovado donas. La filatelistoj-samidenoj estas petataj kunhelpi la aliĝon de ne esp. filatelistoj. Ĉiu membro ricevos senpagan anonceton en nia internacia filatelia bulteno.

Ĉiuj sciigoj de la sveda ĉefagento Bertil Zell,  
Box 5085, Göteborg 5.

## RICEVITAJ GAZETOJ

Norvega Esperantisto, feb 1946. I. a. ni tie trovas la strangan rubrikon "Kelkaj gajaj memoroj el Grini". La klubo en Halden aranĝis esperantokurson en Haldens Arbeiderblad per represo el "Seppik-Malmgren", kun unu leciono semajne.

La norvega gazeto elsendis sian unuan numeron por 1946 i. a. al ĉ. 2000 svedoj kaj danoj. Jarabonprezo estas 3 kr pagebla al poŝtĉeka konto 19071, Stockholm 19.

The British Esperantist jan—febr 1946.

Franca esperantisto, oficiala organo de l'Union Esperantiste de France et des Colonies sept—dec 1945. Presita 16-paĝa kajero, kvaronformato. — Interesa franca kroniko montranta ke en ĉiu parto de Francujo esperanto vivas. Tuta paĝo porinstruista enhavas i. a. ekzamenajn taskojn por traduko el la franca en esp. kaj inverse. Ĝojan reenkonton kun sro Raymond Schwartz ni havas en La Angulo de l'humoro.

Helena Esperantisto, dumonata organo de helenaj esperantistoj, jan—febr 1946, venis de: 23 Str. Rodou, Atén. Jarabono por eksterlando 4 Us. Dol.

Internacia Kulturo, monata gazeto (malnova "Bulgara Esperantisto"), organo de Bulgara Esperantista Asocio, venis el Sofia. Granda 16-paĝa kajero, tute en esperanto. La paĝoj estas luminitaj de bildoj el klasika bulgara arto. La enhavo estas literatura kaj naciekonomia kaj finiĝas per granda nombro de novaĵoj pri la kulturo kaj precipe la esperanta vivo en Bulgarujo. Grandskala kurslaboro respeguliĝas en longa listo de korespondemuloj.

La Juna Vivo, feb 1946, monata organo de Tutmonda Junular Organizo TJO venis el Limmen NH, Nederlando.

Monda Revuo Ilustrita, no 1, estas 12-paĝa bele presita kajero eldonita de C. Pedersen, Poŝtkesto 30, Randers, Danujo. La celo de la nova revuo ŝajnas esti renkontejo por literaturemaj esperantistoj ĉiulandaj.

Paco kaj Justeco, organo de la neŭtrala esp-movado, Brugge, Belgio, nro 1 presita kaj nro 2 kaj 3 stencilitaj, duone en flandra lingvo.

Renovigo, dulingva revolucia gazeto, jan—febr 1946 venis el Mekziko.

Steleto Rosaria, nro 8 venis el Rosario, Argentina.

Sudhungarlanda Stelo, jan 1946, estas nova gazeto, 6-paĝa, presita, organo por la sudlandparta departemento de la hungara esperantomovado.

Svisa Espero, jan 1946, 8-paĝa stencilita.

Arbetar-Esperantisten nr 3 1946.

ABF nr 2 febr. 1946, tidning för Arbetarnas Bildningsförbund, saknar esperantospalt, men har så mycket mer om modespråken engelska och ryska.

Tiberiu Morariu

sendas sunajn salutojn el printempflora, plenlibera fratlando dana. Ok prelegoj en 8 urboj. Intervjuo en Dana Radio.

### RADIOTJÄNST OCH ESPERANTO.

Till svar å en framställning från Odense, Danmark, att få höra esperantoutsändningar i den svenska radion, har Radiotjänst den 1 februari 1946 svarat:

På grund av det otillräckliga utrymmet i vår sändningstid har vi inga möjligheter att f. n. ha esperantoutsändningar i det ordinarie programmet, men saken är föremål för vårt intresse med avseende på kortvägsprogrammen.

Med utmärkt högaktning

Radiotjänst  
Ingvard Anderson.



## Meddelande från Esperanto-Institutet

**SOMERA UNIVERSITATO. Uddevalla 10—15 junio.**

La programo de la Somera Universitato nun estas preta. Estas evidente, ke tiu semajno estos vere enhavoriĉa kaj ĝuinda. Jen la listo de la prelegistoj kaj iliaj temoj:

Einar Adamson, Göteborg:

"Unuigitaj Nacioj kaj la kultura laboro post la milito." "Kultura konkurenco inter grandaj kaj malgrandaj ŝtatoj."

Bjarne Beckman, Strängnäs:

"Problemoj de la historia instruado dum la postmilita tempo." "Vojaĝo al Nederlando."

Einar Dahl, Uddevalla:

"Lernejo — paco — Esperanto."

E. Malmgren Stockholm:

"La Esperanto-movado dum la milito." "La internacia organiza problemo de Esperanto."

Margarethe Noll, Kopenhago:

"La ideaj movadoj en Danujo." "Kompreno, nekomprene, miskompreno."

Vilho Setälä, Helsinki:

"Taskoj kaj problemoj de la internacia kultura laboro postmilita." "Esprimrimedoj de arta fotografado."

J. Stenström, Ulricehamn:

"La lingvoj de la venko kaj de la paco."

Jan Strönne, Malmö:

"Ĉu nova mondo en la signo de la atomenergio."

C. Støp-Bowitz, Oslo:

"La idealistaj movadoj dum la milito en Norvegio." "Mirindaĵoj el la besta vivo."

Fr. Szilagy, Budapest:

"La zamenhofa idearo kaj la rooseveltaj principoj." "Pacifismo kaj socialismo en nia literaturo."

"Rifuĝintoj kaj Esperanto."

Karl Söderberg, Upsala:

"Inaŭgura prelego de la Somera Universitato."

La prelegoj okazos matene kaj vespere. Dum la tagmezoj la kursanoj povos amuzi sin per ekskursoj, ŝipveturoj, banado kaj amika kunestado.

Loĝo kaj manĝo ĉiutage 7:50 kr. Kurskotizo 5:— kr.

Sendu vian aliĝon frutempe al Somera Universitato, Box 900, Uddevalla.

**LA SOMERA LIBERTEMPO. Jursla invitas**

Dum kelkaj pasintaj someroj la esperantistoj en Norrköping invitis nin pasigi someran semajnon en ilia idilia somerhejmo. Lastjare la somerhejmo estis plenŝtopita de gajaj gejunuloj, mezaĝuloj kaj saĝuloj. La plej multaj el ili mendis lokon jam tiam por la ĉijara somerkurso en Jursla, kiu okazos 14—20 julio. Sed kelkaj lokoj ankoraŭ estas liberaj!

Tradicia prelegisto estos nia ŝatata d-ro Fr. Szilagy. Krom tio ni sukcesis persvadi la eksprezidanton de la Estona Esperanto-Asocio, ing. R. Kapper, fari serion da prelegoj. La kurso pritraktos la problemon: "La vizaĝo de la homaro antaŭ, dum kaj post la milito."

La kostoj estas kiel ĉiam malaltaj: aliĝkotizo 5 kr, kaj loĝo + manĝo 5 kr potage.

Aliĝojn akceptas S-ro Sven Ragnar, Norrköpings Esperanto-Förening, Box 49, Norrköping.

Sveda Esperanto-Instituto.

**"INTERNACIA KULTURO"**

monata, grandformata, luksa, riĉe ilustrita 16-paĝa gazeto, eldono de Bulgara Esperanto-asocio. Jarabono 30 respondkuponoj. Adreso: "Internacia Kulturo", Str. Gr. Ignatiev 2, Sofia, Bulgario.

Celo de la revuo estas diskonigi la kulturan, socian kaj ekonomian vivon de la balkanaj popoloj kaj organizi amasan internacian korespondadon. En ĝiaj paĝoj estas senpage publikigataj adresoj de korespondemuloj.

## SEF Kolono

**AMIKARO DE ESPERANTO.**

Antaŭe ni petis vin fariĝi membro de Amikaro de SEF kaj multaj respondis al nia peto pagante 60 kr. Versajne nun estas vane ripeti la peton pri novaj helpemaj membroj — kvankam ni treege bezonas ilin — sed ni tamen ĝojas, se tiuj, kiuj estis membroj pasintjare ankaŭ restos 1946 kaj pagos sian kotizon por subteni nian laboron.

Per AMIKARO DE ESPERANTO tamen ĉiuj havas eblecon helpi al SEF ricevi fortan ekonomion. Vi mem ne bezonas oferi vian propran monon sed nur viajn fortojn, helpante nin akiri membrojn de AE. La kotizo estas nur 2:— kr. kaj ĉiu membro de AE havos ŝancon ricevi unu el la du premioj po 250:— kr. por partopreni en la unua postmilita universala kongreso de esperanto. Ensendu la mendilon, kiun ni sendis al ĉiuj kluboj kaj rektaj membroj kune kun nia Komunikilo/3, kaj komencu tuj vian varbadon.

**DEN NYA MATRIKELN**

skall vara färdig i april och vi hoppas därför att alla, som ännu inte sänt in listan å sina medlemmar, gör detta omedelbart. Tyvärr kan vi inte låta trycka matrikeln ännu utan nöjer oss med en duplicerad även i år. Det blir visserligen mera arbete, men huvudsaken är ju att inte pengarna slösas bort i onödan.

Varje förening som tillhör SEF erhåller 3 ex., distriktens styrelsemedlemmar och alla direkt anslutna medlemmar erhåller 1 ex. var.

OBS! Föreningarna kan beställa matriklar för sina medlemmar till ett pris av 25 öre per ex. Beställningarna måste vara SEF tillhanda senast den 20 april och betalningen insändes per postgiro 2012 eller i frimärken.

**ESTONIO REVIVIGAS**

Antaŭ kelkaj semajnoj venis la unua vivsigno el Estonio per letero de fraŭlino en Jögeva, kiu volas korespondi. Mi tuj respondis por provi ricevi informojn pri la stato de la esperantomovado en tiu lando, kiun tiel multaj el ni vizitis dum la malnovaj feliĉaj tagoj. Krome mi ricevis karton de fraŭlino en Pärnu, al kiu mi plurfoje skribis provante ricevi informojn pri ŝi kaj ŝiaj familianoj por tiel helpi al fratino de ŝi loĝanta en Algerio. Kaj nun mi havas la ĝojon per flugpoŝto peri tiun vivsignon al la familio en Nord-Afriko.

**VARLDSAPPELLEN TILL FN.**

Av 34.000 utsända blanketter hade vi den 26 mars fått in ca 4000. Det gäller alltså att sätta igång slutspurten. Men endast 1000 ex. finns kvar på SEF, så vi överväger därför att låta trycka en ny upplaga om 10.000. Men för att kunna göra detta måste vi dels utsträcka tiden för insamlingen till den 1 maj, dels snarast få in beställningar på åtminstone hälften. Vi förmoda att det ännu finns en stor del av våra medlemmar och även andra ensamstående esperantister, som inte kommit igång med sin del av denna storstilade aktion. Det är dessa vi nu med förtroende vänder oss till: Rekvirera snarast möjligt och sätt igång insamlingen bland vänner, på arbetsplatsen, i föreningar, bland grannar, i affärer, i studiecirkel och överallt där det överhuvudtaget går att komma i kontakt med sympatisörer. Kom ihåg, att ingen kommer oombedd, men att av de ombedda endast få vägra att skriva på.

**SE VI VIZITAS STOCKHOLMON**

vi estas bonvena viziti nin en la sekretariejo, kie ni deĵoras oficiale ĉiuvendrede inter la 19—21 horo, sed ankaŭ dum multaj el la aliaj vesperoj de la semajno. Ni ĉiam ĝojas, kiam niaj membroj venas al ni kaj ni povas konatiĝi kun la homo, kiun ni ĝis tiam nur konis pere de liaj aŭ ŝiaj leteroj.

Sam.

## Membrostatistiko 1945.

Jenaj kluboj ensendis kotizojn por la jaro 1945:

Alingsås (7 membroj), Borlänge (15), Borås (29), Eksjö (9), Eskilstuna (20), Eslöv (9), Falköping (13), Falun (9), Gävle (15), Göteborg (24), Hallsberg (15), Hishult (7), Hälsingborg (20), Härnösand (7), Jönköping (13), Karlskoga (47), Karlstad (5), Kristianstad (17), Krylbo (11), Kumla (14), Lidköping (10), Lund (17), Malmö (101), Motala (11), Norrköping (49), Nybro (12), Nynäshamn (8), Skara (8), Skövde (34), Smedjebacken (11), Sollefteå (13), Stockholm (111), Strömsnäsbruk (3), Sundsvall (17), Surte (12), Söderhamn (3), Tierp (6), Tranås (8), Uddevalla: La Fajrero (14), Verda Stelo (12), Ulricehamn (9), Upsala (35), Vetlanda (7), Vimmerby (6), Västerås (9), Ystad (10), Örebro (32).

Klubaj membroj: Rektaj membroj: Entute:

1944	898 (50 kluboj)	112	1.010
1945	874 (47 kluboj)	154	1.028

## Membrostatistiko 1946.

13 kluboj jam ensendis kotizojn por 1946, nome:

Eslöv (9), Falun (9), Göteborg (29), Hälsingborg (22), Härnösand (8), Ludvika (9), Lund (10), Stockholm (25), Surte (12), Söderhamn (2), Tierp (6), Ulricehamn (10), Västerås (22).

Tio estas imitinda ekzemplo por ĉiuj klubkasistoj. Jam nun enkasigu la kotizon de la membraro kaj sendu la monon al SEF.

**Rektaj membroj — Granda progreso.** Jam 207 esperantistoj en lokoj kie SEF-klubo ne ekzistas aliĝis kiel rektaj membroj. Kiel ni vidas en la statistiko nur 47 lokoj en nia lando havis SEF-klubon dum 1945. Se via klubo pro ia kaŭzo ne povas aŭ ne volas aliĝi al SEF, vi mem povas fariĝi rekta membro. — Se vi estas sola esperantisto en iu loko, senprokraste aliĝu! — En okazo ke vi jam estas abonanto de "Svenska Esperanto-Tidningen" vi povas enpigi la reston kr 3:50 al poŝtĉeka konto 2012. (La kotizo inkl. la gazeton estas kr. 7:50.)

Nia celo estu: 300 rektaj membroj en 1946 (krom miloj kaj miloj da klubaj membroj).

Stockholm la 15an de Marto 1946.

Bengt Skantz.

## Gazetara servo.

Dum 1945 mi dissendis 8 novaĵfoliojn pri esperantaj okazintaĵoj. Mi dum la jaro konstatis 247 artikolojn pri esperanto aŭ pri la mondlingva afero ĝenerale. El tiuj artikoloj 44 emanis de Gazetara Servo. La kosto pro tiuj artikoloj estis 111:58 kronoj. Mi estas konvinkita, ke tiuj ĉi nombroj mensogas. Certe aperis en la gazetoj pli multe da artikoloj, sed oni kutimas ne sendi al mi. Tamen mi kore dankas al tiuj, kiuj efektive sendis! Por instigi al sendado, samideano en Göteborg promesis disloti en ĉiu monato prove 10 kr inter la sendintoj de tondaĵoj. Sed ricevinte por Decembro 7, por Januaro 9 kaj por Februaro 8 tondaĵojn, ni decidis ĉesigi tiun dislotadon. Estiĝas tro multekostaj tondaĵoj. La dek kronojn en la tondaĵa loterio gajnis por Novembro sro Åberg el Skövde, por Decembro sro Fejde el Jönköping, por Januaro 1946 sro Åberg, por Februaro sro Alexandersson el Västerås. Ekde Marto ni pli bone utiligos tiun monon kaj ne dislotos facilnime dekkronajn monbiletojn.

En la komenco de 1946 malsano malhelpis la laboron. Tamen, nun denove komenciĝas la fluo de esperantaj novaĵoj, kaj ni espereble renkontos pli bonajn tempojn.

Oskar Svantesson.

## Sveda Instruista Esperanto-Federacio

(Svenska Lärares Esperanto-Förbund)

Fågelfångaregatan 20  
Telefon 14 93 43

Göteborg V  
Postgiro 3 14 30

**Opettajain Lehti.** En la finnlingva instruista gazeto oni trovas artikolon pri internacia laboro. En tiu artikolo oni akcentas la neceson de internacia lingvo. Menciata ankaŭ estas la entrepreno de IEL prezenti esperanton al Unuigintaj Nacioj. Oni nombras kelkajn en Finnlando konatajn personojn aŭtoritatajn, kiuj subtenas la esperantan movadon. Dum la milito la vivado esperantista ne estis vigla, sed nun la movado plivastiĝas. Subskribis Lauri. — — — El tio ni povas konkludi, ke ankaŭ en la gazetoj instruistaj de nia najbarlando la esperanta movado havas subtenantojn.

Adil.

## SVEDA KRONIKO

### SKARABORG.

**Jarkunvenis la distrikto de Skaraborg** dimanĉe la 3an de marto en Skövde. La reprezentantoj de la distrikta kluboj kolektiĝis en la belega "Studiegården", kie de post nun estas ideala kunvenejo por kursoj kaj studrondoj. La reprezentantoj povis raporti pri kursoj kaj diversaj aranĝoj, kiuj montras konstantan intereson por nia lingvo, kaj ni eĉ en kelkaj lokoj kun sukceso faris gravan laboron propagandan.

En la jarkunveno partoprenis nia ĉeĥa samideano, sro Josef Viték, kiu rakontis pri la situacio de nia movado en Ĉeĥoslovakio dum kaj post la milito.


La estraro por 1946: E. Falk, prezidanto, Lars Westman, sekretario, Gunnar Ring, kasisto, ĉiuj el Skövde, Harry Carlsson, Falköping, v. prez., kaj Eric Victorin, Skövde, v. sekr. Studgvidanto fariĝis Lennart Åberg, Skövde.

Se la pasinta jaro montris efektivan antaŭenmarŝon en la postmilita laboro, ni nun atendas novajn rezultojn, kiuj certigos al nia laboro gravajn poziciojn en la gubernio Skaraborg.

Ri-to.

**Örebro distrikto** jarkunvenis la 24an de marto en Karlskoga en la nova kunvenejo de la tiea societo. Salutparoladis la distr. prez s-ro Loman. Poste prezidis s-ro Lindahl, Karlskoga. La estrara kaj revizia raportoj estis aprobatas kaj deŝarĝo estis decidata. Efektiva komitato konsistos el 3 personoj, kiujn elektas Karlskoga societo inter siaj membroj. Ceteraj estraranoj fariĝis sroj Ström, Kumla, kaj Fritzell, Hallsberg. Estis decidite transdoni la distrikta gvidadon al Karlskoga. Post diskuto pri §4 de la distrikta regularo oni decidis doni al tiu paragrafo evidentigan aldonan vorton. Per tiu decido longedaŭra konflikto estas forigita, kaj regos labortrankvilo.

Post la kunveno la junulara societo "La Aglidoj" sub gvidado de la prez de tiu sekcio G. Karlsson respondis por festeno kun komuna kantado, parolado, recitado, muziko kaj danco. Specialan atenton vekis junulo, kiu en belsona esperanto kun aplombo sciigis la programon kaj esprimis esperon pri prospero. Tre agrabla vespero, en kiu kunagis ankaŭ sroj Lindahl kaj Bonander. Vizitis la kunvenon reprezentantoj el Örebro, Kumla, Hallsberg kaj Karlskoga. La salono estis plena.



Malmöklubbens ordförande  
JAN STRÖNNE.

**Malmöklubbens 40-årsdag** firas annandag påsk, den 22 april, med högtidssammankomst kl. 1500 å Landstingssalen i Rådhuset samt middag kl. 1800 på Palladium.

Deltagaravgift, 2 kr., (och middagsavgift, 10 kr., för dem som så önskar) inbetalas till Malmö Esperantoförening pg 38714. Biljetterna utlämnas jubileumsdagen från särskild exp. i Rådhuset efter kl. 1400.

**Karlskoga.** Dum la festeno la 15an de decembro, estis transdonata la migranta premio. Ĝia unua posedantino fariĝis s-ino Alide Leijder.

La 14an de januaro rekomencis la kursoj, kvankam sen nia bona instruisto d-ro F. Szilágyi, kiu kaŭze de malsano ne povis reveni al Karlskoga. Pro tio la Lingva sekcio kun s-ano R. Lindahl kiel respondeca ano ordigis tiun problemon tiel, ke kelkaj anoj de la societo fariĝis instruistoj. La kursoj iras tre bone kaj estos oficiale finataj per la kursfina festo la 28an de aprilo.

Jaŭde la 7an de februaro ni havis letervesperon, kiu estis tre vigle partoprenata. Venis 60 leteroj el 8 landoj. La plej granda parto de la leteroj estis aĉetata de Junulara sekcio.

La Societo jarkunvenis la 10an de februaro. La revizora raporto balancas sur la sumo je kr. 4.167:71.

La estraro por la nova jaro fariĝis: prez. R. Lindahl, vic-prez. A. Bern, sekr. G. Skagerstrand, vic-sekr. E. Blanck, kasisto H. Forsman, alsidantoj E. Storm kaj Gunhild Tistad. Revizoroj: A. Axelsson kaj K. Franzon. Anstataŭantoj revizoraj: G. Nilsson kaj Tyra Jävert.

Oni decidis, ke ankaŭ dum la sekvonta jaro la laboro estu dividota inter diversaj sekcioj, kiuj preparos la demandojn kaj alimaniere deŝarĝos la laboron de la estraro. Gvidantoj por tiuj sekcioj estos: Lingva sekcio R. Lindahl, redakcia sekcio A. Leijder, labora sekcio G. Nilsson, propagand- kaj programsekcio G. Skagerstrand, ekonomia sekcio Arvid Bern kaj junulara sekcio E. Bonander.

Delegito por IEL: E. Bonander, reprezentanto de E. T. K.: E. Bonander, reprez de E. S. E.: E. Egge-mark kaj kiel bibliotekisto: A. Leijder.

Junulara sekcio jarkunvenis la 6an de februaro. Kiel estraro por la nova agadjaro fariĝis: Prez. Gerhard Karlsson, vicprez. Klas-Ture Jansson, sekr. Sigbritt Helsing, vicsekr. Ingvar Härding, kasisto Inga Aronsson.

Kiel gvidantojn el agula societo la junuloj elektis krom E. Bonander fraŭlinon Anne-Marie Lindblom kaj subparohestron S. Bergström.

**Borlänge.** La Esperantoklubo havis sian jarkunvenon la 8an de marto. Kiel kutime oni dum la pasinta jaro ĉiun duan mardon kunsidis por studadi Esperanta Studservo -n. Dum la lastaŭtuna Esperanto-semajno sufiĉe belarangita fenestro kun Esperanto-libroj ĉe la plej granda urba librovendejo vekis videblan intereson kaj miron de preterpasantaj personoj. Cent ekz. de la propagandonumero estis vendita aŭ disdonitaj, kaj 500 alumetskatoloj disvendigis al privataj personaj aŭ al vendejoj kaj kafejoj por plua disvendado. De oktobro Esp. studrondeto de komencantoj studis sub la gvidado de f-ino Bodén. — La antaŭa klubestraro estis reelektata, nome A. Vadfors, prez, E. Karlsson vicprez, S. Tidstrand kas, M. Jansson sekr kaj M. Aspenström. Oni decidis inviti s-ron Vitek al Borlänge por tie fari prelegon.

B. E. M. J.

**Örebro Esperanto Societo** jarkunvenis dimanĉe la 3an de febr. en la ejo Vintergården. La kunveno estis bonvizitata, kaj post la pritraktoj ankaŭ la anoj de Vintergården kolektiĝis en la ejo al komuna kunestado. La programo estis tre amuza kun i. a. eta teatraĵo de esp.-komencantoj kaj solkanto kun pianoakompano de nia ano S-ro David Palmroth. Plue okazis komuna kantado kaj parolado de holanda samideano, S-ro A. Kropp. Oni ankaŭ kaftrinkis dum paŭzo.

La estraro estis reelektata escepte la sekretarion kaj la vicprezidanton kaj konsistas nun el la jenaj personoj:

Prez. Philip Jansson, v. prez. Gunnar Björk, sekr. Rud. Larsson, v. sekr. Olov Eliasson, kasistino f-ino Dagmar Dahlberg. Delegitoj: al IEL S-ro B. Lavén, al ETK F-ino Ebba Dahlberg.

R. L.

**Motala Esperanto klubo** jarkunvenis la 10an de marto en Lundgrens konditori Varamon. El la jarraportoj oni konstatis, ke la klubo laboris sufiĉe bone dum la jaro, unu studrondo por komencantoj kaj unu por pli perfektaj anoj estis aranĝitaj, krome la klubo aranĝis grandan kunvenon por siaj membroj kaj samideanoj el najbaraj lokoj kun parolado de Fred Turner el Linköping.

La klubo havas 27 membrojn.

Kiel estraro por 1946 estis elektataj: prez. A. Eriksson, v. prez. S. Gustavsson, sekr. H. Svensson, kaj A. Seger, kasisto C. Hallros, kun A. Hellman kaj R. Anderson kiel anstataŭantoj. Revizoroj fariĝis E. Danielson kaj G. Hedin, studgvidanto E. Danielson. Delegito de ABF C. Hallros.

La jarkunveno decidis aranĝi prelegon de la ĉeĥa samideano Josef Vitek en aprilo, pri la temo Ĉeĥoslovakujo dum milito kaj paco.

**Tranås Esperantoklubb** höll sitt årsmöte å Geijers pensionat den 12 mars under ledning av ordf., köpman Åke Wiman.

Den förutvarande styrelsen omvaldes: Åke Wiman, ordf., Ivar Albertsson, v. ordf., Sven Borg, kassör, Ruben Andersson, sekr. och Linnea Fransson, v. sekr. Till revisorer omvaldes Yngve Svensson och Agnes Lööf med Gustaf Lööf som rev.-suppl.

Ordf. Åke Wiman valdes till IEL-delegat. Ombud för förlagsföreningen Esperanto och för Esperantotidningen blev läroverksadj. Sven Borg.

Vidare beslöts acceptera erbjudandet om besök av S-ro Josef Vitek från Tjeckoslovakien den 24 april, varvid Vitek föreläser om "Tjeckoslovakien i krig och fred". Samarbete beträffande anordnandet av Vitek's föreläsning skulle sökas med organisationen Reso. Opinionsyttring för Esperanto som internationellt hjälpspråk förbereddes.

**Västerås.** 18/1: Salex faris skizan raporton pri la organizo de la esperantomovado. 1/2: Legado el Norvega Esperantisto. 15/2: Letervespero. Pro anonco de 10 vortoj en Esperanto Internacia ni ricevis ĝis nun 40 salutojn el 12 landoj. 23/2: Josef Vitek parolas pri Ĉeĥoslovakio. 24/2: Vitek parolas esperante antaŭ 300 gejunuloj en Ungdomsgården interpretata de Salex. Multaj ŝlosiloj venditaj. Loka gazeto intervjuas Vitek. 1/3: Anna Vestberg prezentas al ni novelon el La granda aventuro.

**Hishult.** La klubo dum la vintro ĝis nun havis dek kunvenojn. Ni ankaŭ laboris kiel studrondo kun ok membroj. Ni studas esperanton laŭ korenspondkurso de Hermods. Prez: Malte Markheden, Hishult.

**Stockholma klubo** kunvenas ĉiun merkredon en sia ejo Luntmakargatan 15 unu ŝtup. je la 20 h. La kursfina festo de la vintro okazis la 13an de marto. Vere internacia festo. Kiel reprezentanto de la Rumana Legacio ĉeestis sekretario N. Djuvara kaj inter la gekursanoj estis itala ingeniero, rusa tipografo kaj polaj rifugiĝintoj.



## Förhistorisk grottmålning.

Även de förhistoriska människorna hade sitt språk och sina hobbies. De hade speciella skrivtecken och tillverkade grottmålningar, så att de både kunde förstå varandra och följa med händelseutvecklingen.

Vår moderna tid rör sig med andra språk och andra tidsfördriv för att bibehålla kontakten människorna emellan. Såsom ett önskvärt mål framstår därvid folkens enande genom ett gemensamt intresse.

Ej minst arbetar det redan år 1901 grundade Internationella Samlareförbundet Skandia för detta mål. Förbundet, som har sitt säte i Stockholm, riksföreningar bl. a. i Danmark och Norge samt generalsekretariat litet varstades, är med sina 700 medlemmar i ett 30-tal länder ett lämpligt forum för anslutning också från alla slags samlare med esperanto på studieprogrammet.

Skriv efter prospekt till

**SKANDIA - SERVICE**

S:t Eriksgatan 32 A, II, Stockholm

## Læs "Sol og Sundhed"!

Organ for den danske Solsportbevægelse. — Tidsskriftet har nu igen optaget Esperanto i sine Spalter og gaar ud til mange Esperantister rundt om i Verden. Abonner paa det: 1 Kr. pr Nummer. Helaar 12.00. Fri-mærker modtages. Meget smukt illustreret. Skriv til Sol og Sundhed, R a n d e r s, Danmark.

## Korespondado.

Y. Hochhauser-Armony, POB 2171, Haifa, Palestino, serĉas siajn iamajn gekorespondantojn (iama Cha-Fei-Ho).

## Svenska Esperanto-Tidningen

La Espero

Ansvarig utgivare: W. Wahlund.

Organ för Svenska Esperanto-Förbundet

Redaktör: Eva Julin, Nytorrgsgatan 15, 4 tr. ög., Sthlm.

Tel. 42 53 84.

Prenumerationspris: helt år kr. 4:— . Lösnummer 0:40. Utkommer en gång i månaden.

Annonspris: 20 öre pr mm. Korrespondensannons: 1:50.

Expedition: Förlagsföreningen Esperanto, Box 190 71, Stockholm 19. Tel. 31 65 01. Postgiro 578.

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO u. p. a., post-adress: Box 19071, Stockholm 19 (Expedition: Sveavägen 98.) Tel. 31 65 01. (Förlagschefen: 30 75 15.) Postgiro: 578. (Böcker, tidningar, korrespondenskurser o. s. v.)

SVENSKA ESPERANTO-FÖRBUNDET (Sveda Esperanto-Federacio), Tegelbacken, Stockholm C. Tel. 20 00 43. Postgiro 20 12.

Avgifter: Direkt ansluten medlem erlägger 7:50 kr. pr år och erhåller tidningen gratis. Familjemedlem, som ej erhåller tidning, erlägger 4:— kr. pr år. Förening med kollektiv prenumeration å tidningen för sina medlemmar erlägger för varje medlem en årlig avgift av 5:— kr. För familjemedlem är årsavgiften 2:— kr. Förening, som ej prenumererar kollektivt å tidningen, erlägger för varje medlem 2:— kr. pr år. Varje ansluten förening erhåller ett exemplar av tidningen gratis.

SVENSKA ESPERANTO-INSTITUTET, Tegelbacken, Stockholm. Postgiro 5 15 11.

INTERNACIA ESPERANTO LIGO — IEL (Sveda Teritorio): Ĉefdelegito Karl Wästfelt, Cedergrensvägen 27, Stockholm 32. Poŝtĉeka konto 15 12 88. Kotizoj: Membro kun jarlibro kr. 3:50; Membro-Abonanto 9:—; Membro-Subtenanto 18:—; Patrono 90:—.

## Nöden i Europa.

Esperantisternas hjälpaktion:

Kläder, skodon, strumpor, linne (till spädbarn), nål och tråd sändes till fru Karin Hägglund, Pontoniärgatan 35, Stockholm K.

Pengar (redan en femma eller mindre kan bli till nytta) sändes till Esperanto Förbundet, postgiro 2012, Stockholm.

Angiv särskilt om gåvan avser Ungern enl. dr Szilagys cirkulär till förmån för Literatura Mondos redaktion.

Redigeringen av nummer 5 avslutas den 24 april.

# Y T O N G

La malvarma norda klimato necesigas varmizolajn ekstermurojn. Ordinara konstrumaterialo tial estis ligno, speciale en kamparo kaj urbetoj. La lignaj konstruaĵoj tamen kaŭzis multajn brulakcidentojn.

Dank al la sveda invento "Ytong" oni nun je modera kosto povas konstrui brulreziste sed varme en malvarma klimato. Ytong estas poroza betono, tiel malpeza ke ĝi povas naĝi sur akvo, sed tamen fortika.

Svedlingva broŝuro havebla senkoste.

**YXHULTS STENHUGGERI A.B.**  
**Hällabrottet**